

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №2



Internacia sendependa magazino. 2017. №2 (268)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Alexander Schlafer, Andrzej Sochacki

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 65-66.

Abontarifo por 2017

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2017, №2 (268).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 31 января 2017 г.

© La Ondo de Esperanto, 2017.

Kovropaĝo.....	1
Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3

Intervjuo..... 5

Stefan MacGill respondas: Intervjuo kun la Esperantisto de la Jaro 2016	6
---	---

Temo 10

Niaj atingoj kaj malsukcesoj en 2016.....	11
Aleksander Korĵenkov. Bela virtualo, sed lama realo en 2016.....	17

Eventoj 18

Russ Williams. La oka novjara junulara semajno	19
Liba Gabalda. La 15a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken	21
Adjé Adjévi. La sesa kongreso en Afriko	23
Ján Vajs. La frosta Poludnica	25
Maje estu gaje!.....	26
Szilvási László. Reklamo: 80 eŭroj por 96 mil personoj kaj 2300 klakoj	27
Novjorka prelegserio daŭras en la jaron 2017	28
Laboru kune kun UEA	29
Ni realigu la unuan IJK en Afriko!.....	30
Kursoj kaj klerigofertoj de Esperanto-Centro Herzberg	31
Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge denove ĉe NASK	32
Irina Gonĉarova. Bonvenon al APERo-11!.....	33
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Zbigniew Galor forpasis	34
Koncize (10 informoj)	35

Tribuno 36

Dafydd ab Iago. Ĉu EU daŭros?	37
Junulara ARTE sub la aŭspicio de TEJO.....	38
Xavi Alcalde. Tradicio kaj moderneco. Pri TEJO kaj la Civito.....	38
Robert Nielsen. Ĉu ekzistas du movadoj?	40

Urboj de Ruslando..... 42

Nikolao Gudskov. Jaroslavlo – la ursa angulo	43
--	----

Arkivo	47
Przemysław Wierzbowski. Ankoraŭfoje pri la naskiĝo de Marko Zamenhof ...	48
Kulturo	50
Julian Modest. Dancanta kun ŝarkoj: Rakonto	51
Fabrício Valle. <i>Heroldo</i> : “Ne flagoj, sed agoj”	53
Stanislav Belov. Bohemiaj lumoj en makabra malhelo (Recenzo: Ramón del Valle-Inclan. <i>Bohemiaj lumoj</i>)	54
Bernhard Tuidier. Nova skanprojekto en Vieno	57
Flo! <i>Kreaktiva</i> : Nova albumo de Jonny M	58
Ricevitaj gazetoj	58
Belartaj Konkursoj de UEA en 2017	59
Mozaiko	60
Respondoj al la decembra enigmo.	61
Pri kiu temas.	61
Valentin Melnikov. Versportreto 5.	61
Viktor Alikin. Krucvortenigmo “Brilianto”	62
Halina Gorecka. Pri kio ridis Zamenhof.	63
István Ertl Spritaj splitoj kaj preskeraroj	64
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	65
Reklamo.	67

Sur la kovropaĝo de la februara *Ondo* estas la preĝejo de Profeto Elio, unu el la plej konataj vidindaĵoj en la miljara rusa urbo Jaroslavlo, pri kiu rakontas Nikolao Gudskov en nia ciklo “Urboj de Ruslando” (vd. p. 42-46).

Dum multaj jaroj ni aperigis en la februara kajero de *La Ondo de Esperanto* la tradician revuon de la Esperanta libroproduktado dum la antaŭa jaro. Sed ĉi-jare ni estas devigitaj rompi la tradicion, ĉar ankoraŭ aperis ne ĉiuj numeroj de la revuo *Esperanto* por 2016, kies rubriko “Laste aperis” estas la bazo de la statistiko. Ni esperas, ke ni ricevos la mankajn numerojn antaŭ la finpretigo de la marta *Ondo*.

Ne forgesu (re)aboni “La Ondon” por 2017

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Intervjuo



En la januara kajero de *La Ondo de Esperanto* ni informis, ke Stefan MacGill, 68-jara novzelanda esperantisto loĝanta en Hungario, iĝis la Esperantisto de la Jaro 2016.

Malgraŭ sia granda okupateco, interalie pri la redaktado de la vintraj numeroj de la revuo *Esperanto*, li afable konsentis respondi al niaj demandoj.



Stefan MacGill respondas

Intervjuo kun la Esperantisto de la Jaro 2016

Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

Mi estis komplete surprizita kaj ĝojas pro la agnosko de miaj laboroj kaj streboj.

Vi ricevis ĉi tiun honoran titolon unue “pro la lanĉo kaj realigo de la programo de UEA pri Aktivula Maturigo (AMO), speciale pro la planado kaj okazigo de pluraj AMO-seminarioj en diversaj landoj”. Bonvolu rakonti pri ĉi tiu programo.

Ĝi estas nia reago al la fakto, ke nia eta komunumo ne havas potencajn helpantojn. Ni prosperos grandparte pro niaj propraj pretecoj persisti. Ne sufiĉas amato kaj diversdirekte persisti. Tial ekzistas tiu kerna imperativo organizi trejnan programon.

Kiom da AMO-seminarioj okazis ĝis nun?

La sekva estos la 30a. Ok okazis en 2014, naŭ en 2015 kaj dek en 2016. En 20

landoj en kvar kontinentoj. Ni jam havas ĝis julio naŭ, do en la tuta jaro atendeblas 12 aŭ 13. La apetito por trejnado ŝajnas nesatigebla!

Kiu(j) el ili estis, laŭ vi, la plej sukcesa(j) en 2016?

Elstaras la du seminarioj kiujn ni nomas SUPER-AMO; tio estas, sesioj por trejni trejnistojn. Ekzemplo de nia interna politiko de daŭripova evoluo. Por mi persone, la plej elstaraj estis la 20a en Katmanduo, Nepalo kaj la 21a en Bandung. Indonezio. Novaj landoj por mi persone kaj por la AMO-programo.

Ni legas en la decido pri via laŭreatiĝo ankaŭ jenon: “... kaj pro informado pri ili kaj pri aliaj movadaj aktivadoj”. Temas pri la estraraj komunikoj, aŭ EKOj, kiujn vi redaktas kaj dissendas. Antaŭ la apero de EKOj, UEA rilatis kun la membroj per artikoloj en la revuo *Esperanto* kaj per Gazetaraj Komunikoj (jam pli ol 660). Kial estis lanĉita plia informa serio?

EKO atingas parte aliajn ricevantojn ol la Gazetaraj Komunikoj (GK). Oftas, ke temposentiva alvoko povos preskaŭ tuj aperi en EKO, kiam kontraste ne plu indas aperigi ĝin en la revuo pro la jama paso de la limdato ĝis eĉ la reta aperigo de la revuo. Ĝuste hodiaŭ mi spertis precize tian kazon. GK konsistas nur el tekstoj, EKO akceptas kolorajn bildojn, mapojn, diagramojn. Spaco en EKO estas preskaŭ senpaga, dum revu-hektaroj kostas ege. EKO permesas aperigon de pliaj detaloj ol nia revuo. Tra jaroj GK tendencis trakti ĉefe oficejajn kaj formalajn temojn (feliĉe tio iom ŝanĝiĝas kaj nun aperas informoj pri la agado, i.a. de estraranoj).

 Universala Esperanto- Asocio	 AKTIVULA MATURIGO Estrara Subteamo: MOVADO
--	---

Kiom da EKOj vi pretigis?

Naŭ en 2013, 52 en 2014, 53 en 2015 kaj 40 en 2016 kaj ĝis nun unu en 2017. Do, entute 155, averaĝe 3.7 monate kontinue tra 42 monatoj – kun intensaj preskaŭ realtempaj aperigoj el la kongresoj en 2014 kaj 2015. Ni nun diskutas estonton por

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Temo

Ankaŭ ĉi-foje ni petis diverstendencajn aktivulojn respondi la tradician demandon: “Kiu(j) Esperanto-evento(j) en la 2016a jaro, laŭ via opinio, estas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j)?”

Peter Baláž

Renato Corsetti

Mireille Grosjean

Katalin Kováts

Chuck Smith

Trezoro Huang Yinbao

Łukasz Żebrowski

Anna Bartek / Anjo Amika

Mark Fettes

Dennis Keefe

Vinko Markovo

Humphrey Tonkin

José Antonio Vergara

Momento el la pasinta jaro: Esperantista procesio en Nitro (Foto: Jozef Baláž).



Niaj atingoj kaj malsukcesoj en 2016

Peter Baláž (Slovakio)

E@I-kunordiganto, estrarano de EEU

Mi mencias ankaŭ plurajn agadojn, en kiujn mi estas/is envolvita – ĉar tiujn mi plej bone konas:

Pozitivoj: 1. Rekonstruo kaj kompleta teknika refaro de lernu.net somere; 2. Daŭra kresko de uzantoj ĉe Duolingo, aldone lanĉita hispana versio; 3. Sukcesa financa kampanjo por Amikumu, ni vidu, ĉu la projekto iĝos vere sukcesa kaj utila, kiel multaj esperas de ĝi; 4. La 101a UK en Nitro, malgraŭ relative malmultaj partoprenintoj, la programo vere abundis. 5. Prelego en Esperanto pri lingva politiko de litova eŭrokomisionano Vytenis Andriukaitis, unuafoje eŭrokomisionano prelegis en Esperanto (dum la lingvopolitika konferenco en Nitro). 6. Teknika rekonstruo de Libera Folio; 7. Eldono de pluraj valoraj libroj (ankaŭ *Bridge of Words*).

Negativoj: 1. Daŭra malkresko de la membroj en UEA/TEJO; 2. Maltro da atento al la Manifesto de Prago, kiu 20-jariĝis en 2016 kaj daŭre estas tre valora kaj trafa dokumento pri “kiu ni estas kaj kion ni volas”; 3. Relative malgranda atento al la 100a datreveno de la morto de Zamenhof; 4. Anoncita fermo de Ipernity, en kiu troviĝas amaso da Esperanto-materialoj.



Mark Fettes (Kanado)

Prezidanto de UEA

Pozitive: 1. Daŭra kresko de retaj lernantoj de Esperanto, unuavice en Duolingo kaj en lernu.net, kiu estis relanĉita kun ampleksa nova kurso kaj nova aspekto; 2. Komenco de la renovigo de esperanto.net por krei modernan multlingvan “mon-trofenestron” pri Esperanto; 3. Renovigo de la Statuto de UEA, konfirmante la juran memstarecon de TEJO kaj malfermante la vojon al utiligo de retaj rimedoj por elektoj, referendumoj k.s.; 4. Laŭorda transiro de la Centra Oficejo de UEA inter malnova kaj nova Ĝeneralaj Direktoroj; 5. Aĉeto de Volontula Domo de UEA en Roterdamo por subteni plivastigon de la Volontula Servo; 6. Sukcesa UK en Slovakio kun nekutime vasta kaj ambicia programo por neesperantista publiko; 7. Projekto de TEJO okazigi seminariojn kaj IJK en Afriko kun helpo de eŭropaj subvencioj.

Negative: 1. Grandaj malfruoj ĉe la revuo de UEA; 2. Maltro en la afrika movado, unuavice en Togolando; 3. Neokazo de la planita Tutamerika Kongreso en Kolombio; 4. Daŭra malkresko de la individua membraro de UEA.





Anna Bartek / Anjo Amika (Hungario)

Kantistino, redaktoro de *Heroldo de Esperanto*, opozicia senatano en la Parlamento de la Esperanta Civito

Niaj atingoj:

– Realigis la Kolokvo pri vivanta lingvo de vivanta popolo pri denaskismo fine de februaro 2016.

– Sukcesa debuto de Arta Renkonto Transnacia en Esperanto (ARTE) en Budapeŝto.

– Okazis la balotado al la Civita Senato; gajnis la Verda listo.

– En 2016 regule estis aperigitaj la numeroj de *Heroldo de Esperanto*.

Malsukcesoj:

– La neapero de la revuo *Esperanto*.

– Ne agnosko de la 6a AKE, okazinta en decembro 2015, en Togolando; estis punitaj la togolandaj esperantistoj pro realigo de la 6a AKE.

Katalin Kováts (Nederlando)

Redaktoro de www.edukado.net, gvidanto de la ekzamenkomisiono de UEA

Sincere dirite, mi devis longe cerbumi por trovi elstarajn pozitivajn aferojn por 2016. Kiel lingvoinstruiston min pleje ĝojigis la nekredebla kresko de la nombro de novaj lernantoj de Esperanto, kio estas rezulto de la populareco de la anglalingva Duolingo kaj apero de la hispanlingva versio. Post plurjara rekonstruado estis lanĉita ankaŭ la nova lernu.net, kiu inter aliaj per unusola, fake kaj bone konstruita lingvokurso povos multe kontribui al la disvastigo de la lingvo. Sed ni ne havu iluziojn, ĉar la centmiloj da kursfinintoj tamen ne estas ankoraŭ esperantistoj, eĉ ne parolantoj de la lingvo.

Por igi ilin tio la projektoj Ekparolu! kaj Amikumu ebligas al la novuloj aplikadon de la lingvo, ensociĝon, en kiu proceduro povas havi gravan rolon ankaŭ simplaj esperantistoj, ajna membro de la movado kaj la tasko ne transmetiĝas nur al la gvidaj asocioj kaj organizoj.

2016 tamen ne estos jaro, kiun mi specife volos memori. Mi eĉ strebos forgesi la ĝeneralan malkontenton de homoj, la malkreskon de la membraro ĉe UEA, la nur promesitajn, sed ne plenumitajn taskojn kaj projektojn.



Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj

Ĉi-foje en la sekcio “Eventoj” enestas raportoj pri vintraj esperantistaj renkontiĝoj, interalie, pri la 15a Novjara Renkontiĝo de EsperantoLand en Saarbrücken (vd. p. 21) kies bunta programo enhavis eĉ origamiadon de gepatroj kaj infanoj.

(Foto: Brian Moon)





La Perdita Generacio en JES (Foto: Ivo Miesen)

La oka novjara junulara semajno

La novjara JES (Junulara Esperanto-Semajno, <http://jes.pej.pl/2016/>) okazis jam la okan fojon, ĉi-foje en agrabla pitoreska “arbara hejmo” Waldheim (junulara ripozejo) apud lago en nordokcidenta Germanujo.

Samkiel antaŭ jaro en la hungaria JES en Eger, ĉirkaŭ 150 partoprenantoj venis kaj ĝuis la semajnon. La ejo ofertis kabanajn kaj ĉambrojn en domoj. Krome samloke estis manĝoservo, programejoj, koncertejo, drinkejo, ktp, do ĉio estis sufiĉe konvene surloke.

La arbara ripozejo situas laŭdire unu horon for piede de la apuda stacidoma urbeto Nortorf, kaj busoj inter Nortorf kaj Waldheim maloftis. Bonŝance la afablaj organizantoj aranĝis veturojn de la stacidomo por ĵusalvenintoj laŭ telefonpeto. Malkiel en antaŭaj JESoj, mi do ne vere esploris la urbon mem, sed restis kontente surloke la tutan tempon!

La manĝoservo estis bona, kun bufedo tri fojojn tage, kaj multaj JESanoj ĝuis kune prepari la grandiozan bongustan silvestran festenon. Jen interesa statistiko: la unuan fojon estis malpli multaj mendoj por vianda manĝoservo ol por nevianda! La kvanto da vegetaranoj kaj veganoj en JES kaj similaj eventoj kreskadas.

Pluraj bonegaj koncertoj okazis de popularaj kaj diversstilaj muzikistoj. Kimo

akordione gvidis tradician interkonan vesperon, kantigante homojn kaj gvidante viglan tradician dancadon kun posta vera koncerto. La sekvan vesperon *inicialoj* dc prezentis sian iom kosman elektronikan muzikon, inkluzive de sia nova albumo *La granda aventuro*. La 1an de januaro laŭ sia tradicio ĴeLe alterne trankvile kaj vigle malfrunokte koncertis kun diversaj akustikaj instrumentoj (piano, violono, ukulelo, ktp) al sidanta publiko en la manĝejo, post la furora danciga koncerto de *La Perdita Generacio* en la koncertejo. La 2an okazis regea koncerto de Jonny M, kun multaj novaj kantoj (foje amuzaj, foje kortuŝaj) de la nova albumo *Kreaktiva*.

Gunnar Fischer estris la tradician diskejan silvestran balon.

Krome okazis multaj aliaj programeroj: la tradiciaj gufujo kaj drinkejo kaj diskejo, libroservo, lingvaj kursoj, dancaj kursoj, sciencaj kaj matematikaj prelegoj, desegnado de vizaĝoj, triktraka turniro, poemtraduka ateliero kaj posta poezia deklamado en la gufujo, tabulludado (tre diverse, de Tabuo ĝis Ŝogio) en nekutime laŭdinde bona ludejo, promenoj en naturo, ekskursoj (al la ĉarma urbo Lubeko kaj farejo de marcipano; al marbordo kaj lumturo; kaj al observatorio), mallonga freneza naĝado en la frosta lago(!), kaj multaj diversaj aliaj.

Estis bonege revidi malnovajn amikojn kaj ekkoni novajn. Kiel ĉiam mi multe ĝuis mian semajnon en JES, kaj mi dankas la sukcesajn organizintojn kaj volontulojn. La sekva JES okazos en la pollanda urbo Szczecin; mi certe intencas iri kaj rekomendas ĝin al ĉiuj junaj en la koro.

Russ Williams

Grupfoto de Ivo Miesen



La 15a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken

Post unu jaro ni denove renkontiĝis en Saarbrücken por kune festi la Novjaran Renkontiĝon en gaja kaj amika etoso. La evento estas organizata de la asocio EsperantoLand. La ĉeforganizanto Lu Wunsch-Rolshoven kun pluraj helpantoj pretigis interesan jarfinan semajnon. Pri la programo zorgis Betti Maul, pri la tekniko okupiĝis Pjotr de Mulder kaj Klaus Rumrich. Al la programo multe kontribuis ankaŭ Ines kaj Christoph Frank. La NR-on partoprenis 196 geesperantistoj el 15 landoj ne nur el Eŭropo. Ĉeestis multaj familioj kun infanoj kaj gejunuloj ĝis 19-jaraĝaj.

La riĉa programo kontentigis ĉiujn ĉeestantojn, kiuj povis ĝui prelegojn, diskut-rondojn, laborgrupojn, atelierojn, kvizojn, diversniveleajn Esperanto-kursojn. Oni povis lerni ankaŭ la hispanan. Ne mankis riĉa libroservo, variaj tabloludoj, filmoj, malstreĉiga gimnastiko aŭ ritme vigla zumbo, kurso de tango kaj ĉendancado. Intereson vekis plibonigo de memoro per la japana lingvo, budaisma plenkonscia meditado, balada kulturo de Feroaj insuloj, la libroarto-Orimoto kaj aliaj programeroj.

Ni eksciis, kiu inventis la komputilon kaj kial oni neas sciencon, kien iros Eŭropo post la breksiĝo, pri la dana filozofo Martinus, pri liberalaj religioj, pri Duolingo, pri la Edena ĝardeno, pri justa komerco, pri gravitaj ondoj, pri Esperanto en Afriko, pri perspektivoj de la Eŭropa Unio kaj eĉ pri bano, duŝo kaj necesejoj tra la mondo. Interesis nin matematika prelego pri senfineco, ĝiaj problemoj kaj paradoksoj, la historio de Kubo kaj Usono, la vivo en strangaj mondoj kaj la vivo sur la orient-frisaj insuloj.

Ni diskutis pri monda politiko, pri enmigrantoj, pri disvastigo de Esperanto, pri ReVo (Reta Vortaro). La projekton “Unu leciono pri Esperanto por ĉiuj lernejanaroj” proponis Lu Wunsch-Rolshoven. Pri la demando “Ĉu normalaj infanoj ankoraŭ ekzistas?” prelegis kaj diskutis Martin Markarian. Pri “Ĉu reguligita laŭleĝigo de kanabo estas dezirinda?” raportis kaj diskutis Markos Kramer. Gijom’ Armid organizis seminarion pri “Vivi por feliĉi aŭ feliĉi por vivi?” Okazis tradukateliero kun Brian Moon kaj István Ertl, konstruo de sorobano kun Kimie Markarian, Risko-kvizo kun Eddy van den Bosch, scienca kvizo por teamoj kun eksperimentoj kun Klaus Rumrich, skeĉoj de Mirejo Grosjean okaze de la jaro de lernado.

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno

«Se iu politikisto antaŭ dek jaroj proklamus, ke en 2020 la Eŭropa Unio disfalos, oni eble pensus, ke tiu politikisto estas mense malsana. Sed hodiaŭ pli kaj pli da homoj aŭ celas aŭ timas la disfalon de EU» (Dafydd ab Iago)

«... proponi ion novan kaj profit-donan en temo tiel multdimensia kiel Esperanto, endas koni ĝian historion. Se ne, en plej bona okazo oni riskas reinventi la radon» (Xavi Alcalde)

«... ekzistas granda divido inter esperantistoj kiuj uzas la interreton kaj tiuj kiuj partoprenas renkontiĝojn. Fakte, apenaŭ iu apartenas al ambaŭ flankoj, interrete mi ne vidas kongresanojn kaj la interretantoj ne partoprenas kongresojn» (Robert Nielsen)



Ĉu EU daŭros?

Bruselo. — Se iu politikisto antaŭ dek jaroj proklamus, ke en 2020 la Eŭropa Unio disfalos, oni eble pensus, ke tiu politikisto estas mense malsana. Sed hodiaŭ pli kaj pli da homoj aŭ celas aŭ timas la disfalon de EU.

Malpli da homoj pripensas, kio anstataŭos la Eŭropan Union en Eŭropo. Ĉu ni revenos al Eŭropo de nacioj same kiel antaŭ la dua mondmilito? Tia Eŭropo de nacioj aperas nun ofte en la imagoj de politikistoj. Sed la timo estas, ke ĝi ne plu povas respondi al la demandoj de Eŭropo, kie ne plu eblas antaŭeniri al la mondo de la 1930aj jaroj. Kiom da ni, esperantistoj, esperas je monda registaro? Kiom da ni konsideris la Eŭropan Union ekzemplo sur la vojo al tia monda registaro?

La problemoj, kiujn frontas Britio ĉe la eliro el EU, montras, kiom malfacile estus por EU-landoj vivi sen EU. La popoloj de Britio, kiel granda lando, post dek jaroj verŝajne retrovos la saman vivnivelon, kiun ili havas en 2017. Tamen por multaj aliaj landoj de EU – eĉ por grandaj landoj kiel Francio kaj Germanio – eliro el EU estus atako al la persona riĉeco de civitanoj.

Ĉu paroli pri homaj kaj politikaj rajtoj? La eliro el EU permesus al la ĉefoj en kelkaj landoj – ekzemple, Hungario kaj Pollando, sed sendube ankaŭ al aliaj – starigi politikajn kaj sociajn sistemojn, kie ne eblas al la reganta partio aŭ politikisto perdi la povon. En tiuj landoj ekster EU oni ĉiam antaŭ la voĉdonado scios, kiu gajnos.

Iom da espero donas homoj en diversaj germaniaj urboj, kiuj unuiĝas sub la standardo “Korbato de Eŭropo”. Tamen pli gravas ke eŭropaj ministroj kaj ĉefministroj donu al Eŭropo la povon decidi, kaj rapide decidi. Restos tro multe da aferoj, ĉar nun eĉ unu EU-lando povas bari ĉiujn aliajn landojn, kiuj volas antaŭeniri.

Kiel esperantisto, vivanta en la koro de Eŭropo, mi daŭre esperas, ke EU transvivos la venontajn jarojn.

Dafydd ab Iago



Tradicio kaj moderneco. Pri TEJO kaj la Civito

La informo pri aŭspicio, donita de TEJO al junulara arta renkontiĝo, patronata kaj sponsorata de la Esperanta Civito, kaŭzis polemikon en la reto. Xavi Alcalde proponas sian originalan opinion pri la afero.

Ekde ĝia kreo, du kontraŭaj tendencoj kunestas en la sino de nia movado, kva-zaŭ ne povintus ekzisti unu sen la alia. Unuflanke, Esperanto ŝajnas ankrita en la pasinta jarcento. Revuoj, organizoj, agmanieroj... Sufiĉas rigardi la plimulton de la retejoj por konstati, ke ĝenerale ili malmmodernas. Aliflanke, historie esperantistoj ĉiam rolis inter tiuj, kiuj enkondukis novaĵojn. Temas pri pioniroj de ŝanĝoj, kiujn poste brakumos la cetera socio. En granda mezuro, ili ankoraŭ rolas tiele.

Homoj, kiuj identigas sin kun unu el tiuj du tendencoj, konsideras la alian tiom for de ilia realo, ke malfacilas dialogi... kvankam parolante la saman lingvon. Kiel trovi ekvilibron? Ĉu ili estas akordigeblaj? Kiel kombini iliajn plej interesajn elementojn por konstrui pli koheran kaj potencon movadon? Miaopinie, ambaŭ tendencoj necesas (iagrade) por la daŭrigado kaj estonteco de Esperanto.

Unue, tradicio. Eble la plej granda kritiko, kiun suferis la esperantistoj ekde la komenco, estis ĝuste la manko de kundividita tradicio. Multe penis Zamenhof tiurilate, kaj multon kunkreis malsamaj generacioj de esperantistoj. Jen fierinda riĉeco el kiu endas konstrui. Tradicio nepras, interalie, ĉar ĝi ebligas al ni kolektivan identecon, kiun ĉiu socia movado bezonas por la supervivado. Tamen ne ĉio povas esti nur tradicio. Alikaze, Esperanto iĝus nature anakronisma.

Ekzemple, ĝis kioma grado havas sencon la ekzisto de centoj de revuoj lokaj, regionaj, naciaj, internaciaj, sennaciaj?.. Kiam mi decidis verki ĉi tiun tekston, la unua demando estis: en kiu revuo mi publikigos ĝin? Kompreneble, mi celas, ke homoj kiuj interesiĝas pri tiaj aferoj legu min. Tamen la komunumoj de legantoj estas tiel fragmentitaj, ke plimulto el ili nur legas unu aŭ du revuojn. Se estintus malpli da revuoj, sed pli prestiĝaj, la debatoj (ambaŭ *per* kaj *por* Esperanto) pli vivus, pli intensus, pli signifus. Tial estus bezonate ekzercado de humileco kaj de kunlaboro inter malsamaj asocioj por unuigi kelkajn el iliaj eldonaj projektoj. Nuntempe tio ne okazas. Fakte tiuj, kiuj formulas interesajn opiniojn, ne legas unu la aliajn. La plej riĉenhavaj dialogoj aperas eventuale en maltaŭgaj forumoj, kiel sociaj retejoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Urboj de Ruslando

*Jaroslavlo estas granda urbo
(ĉ. 600 000 loĝantoj) je 280 km
nord-oriente de Moskvo.*

*Ĝi famas unue pro tio, ke inter
ĉiuj Volgaj urboj ĝi estas la plej
bela – kaj loĝantoj de neniuj aliaj
Volga urboj protestas kontraŭ tiu
aserto!*

*Due, Jaroslavlo ĉiam famis kiel
urbo tre pura kaj bone zorgita.*





Jaroslavlo – la ursa angulo

Jaroslavlo (ruse: Ярославль, Jaroslávli) estas granda urbo (ĉ. 600 000 loĝantoj) je 280 km nord-oriente de Moskvo. Ĝi famas unue pro tio, ke inter ĉiuj Volgaj urboj ĝi estas la plej bela – kaj loĝantoj de neniu alia Volga urbo protestas kontraŭ tiu aserto! Due, ĝi ĉiam famis kiel urbo tre pura kaj bone zorgita. Kaj trie, ĝi estas la sola urbo de Rusio, kiu plene (nu, bone, ne plene, sed ja ties tuta malnova parto) estas inkluzivita en la listo de la monda kultura heredaĵo de Unesko. Jes ja, ĝi havas longan kaj gloran historion. Sed komence ĝi havis alian nomon: Ursa Angulo.

En la rusa lingvo ekzistas esprimo “ursa angulo”, kiu signifas malproksiman lokon, kie loĝas precipe ne homoj, sed ursoj... Sed iam, antaŭ mil jaroj, ĉi tiel nomiĝis urbeto de la finna tribo merja, troviĝinta ĉe la enfluo de la rivero Kotoroslj (Которосль) al Volgo. Tie la paganoj adoris kiel totemon la urson kaj tenis en speciala stalo la sanktan beston. La loko havis strategian signifon – Kotoroslj estis la natura vojo, kiu kunligis la antikvan centron de la regiono, Rostovon, kun la gravega rivero, kaj tiuj paganoj fojfoje rabis ŝip-karavanojn.

La princo Jaroslavo (estonta granda Kieva, t. e. tutrusia, princo, ricevinta la kromnomon “la Sagaca”), reginta tiam en Rostovo, venis al la urbeto de paganoj kaj ne nur venkis ilin, sed – plej grave! – mortigis ilian sanktan toteman ursinon... Kaj sur tiu loko li fondis sian propran urbon-fortikaĵon, kiun li nomis, kompreneble, honore al si mem. Ĉi tiu evento okazis iam inter 1005 kaj 1024, sed oficiale kiel la fondojararo estas akceptita 1010, kaj en 2010 oni solene, kiel tutlandan eventon, festis la miljariĝon de Jaroslavlo. Cetere, la venko de la kristana princo ne signifis tujan venkon de kristanismo – la kroniko diras, ke en 1071 du paganaj pastroj el Jaroslavlo ekgvidis kruele subpremitan kontraŭkristanan ribelon. Sed la urso kun halebardo poste (paradokse!) fariĝis la blazono de Jaroslavlo (kaj la ĉeesto de urso sur la urba blazono parencigas Jaroslavlon kun tiaj urboj, kiaj Madrido kaj Berlino).



Kaj en la muzeo-rezervejo ekde 1988 loĝas enkaĝe la viva urba simbolo – ursino Manjo. Do, iom el la pagana urso kulto en Jaroslavlo transvivis mil jarojn...

Komence de la 13a jarcento en la urbo ekregis propra apanaĝa princo, aperis du monaĥejoj kaj la unuaj brikaĵoj, sed en 1238 ĝi estis detruita rezulte de la mongola invado. Ankoraŭfoje Jaroslavlo estis detruita post ribelo de loĝantoj en 1257 jaro. Tamen la urbo plu ekzistis kiel la centro de malgranda princlando ĝis 1463, kiam ĝi definitive eniris la formiĝantan Moskvan Regnon. En la 16a jarcento komenciĝis la komerca disfloro de la urbo, kiu troviĝis sur kruciĝo de la vojoj: de Moskvo al la norda havenurbo Arĥangelsk, kun la Volga riverovojo de oriento al okcidento.

Dum la Granda Malordo (1598–1613) la urbo estis kelkfoje sieĝata; fine ĝi ludis gravan rolon en la koncentriĝo de fortoj de la unua rusa milico en 1611 (fiaskinta), kaj de la dua milico sub la gvido de Kosmo Minin kaj Demetrio Poĵarskij

por liberigo de Moskvo de la pollandaj taĉmentoj. En aprilo-junio 1612 Jaroslavlo ludis rolon de la rusia ĉefurbo; tie estis emisiata arĝenta mono, necesa por la bezonoj de la milico.

La 17a jarcento fariĝis periodo de la plej granda disfloro de la urbo. Tiam ĝi estis la dua post Moskvo laŭ la grandeco en la lando (nun – nur la 25a), triono el la centoj de la plej riĉaj negocistoj loĝis tie. Sufiĉas diri, ke dum la 17a jarcento en la urbo estis konstruitaj 60 grandaj preĝejoj – cetere, poste oni preskaŭ ne plu konstruis la novajn, ĉar la konstruitaj jam sufiĉis! Jaroslavlaj arkitektoj kaj pentristoj ellaboris sian propran artan stilon, oni invitadis ilin labori al multaj aliaj lokoj, ankaŭ al la ĉefurbo. Unu el karakterizaj trajtoj de la Jaroslavla arkitekturo estas abunda uzado de multkoloraj majolikaj tabuletoj, frisoj kaj grandaj dekoraj detaloj – ekzemple, la fenestrornamo de la preĝejo de Johano la Orbuŝa altas je 8 metroj. Unu el la plej mirindaj preĝejoj de tiu epoko – de Johano la Baptisto – nuntempe ornamas la 1000-rublan monbileton. Bedaŭrinde sur tiu bildo oni ne povas vidi belegajn freskojn de Dmitrij Pleĥanov, kiuj troviĝas interne...

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Ĉi-jare ni havas ne nur la cent-jaran datrevenon de la morto de Ludoviko Zamenhof, sed ankaŭ du datrevenojn de lia patro, Marko Zamenhof (1837–1907), kiu naskiĝis antaŭ 180 jaroj kaj forpasis antaŭ 110 jaroj. Tio estas bona preteksto por publikigi la enskribon pri la naskiĝo de Marko (Mordeĥaj, Mordka, Mordĥe, Motel, Markus...), kiu estas konservata en la Ŝtata Arkivo en Suwałki.

La dokumenton komentas Przemysław Wierzbowski, prezidanto de la Bjalistoka Esperanto-Societo.

Ankoraŭfoje pri la naskiĝo de Marko Zamenhof

La 2017a jaro estas riĉa je datrevenoj. Du el ili tuŝas la patron de Ludoviko Zamenhof, Markon, kiu naskiĝis antaŭ 180 kaj mortis antaŭ 110 jaroj.

Informojn pri li mem kaj pri lia parenkaro donas al ni naskiĝatestiloj troviĝantaj en la Ŝtata Arkivo en Suwałki. Inter la rete konsulteblaj dokumentoj¹ troveblas atestilo, kiu plej interesas nin, nome: en la “Aktoj de Oficejo de la Civila Stato de anoj de Judisma Kredo de la Distrikto de Suwałki kaj Jeleniewo el la jaro 1837” sub la pozicio 20 troviĝas jena pollingva² enskribo:

Tio okazis en la Urbo Suwałki la sepan de februaro de la jaro mil okcent tridek-sepa, je la dek-unua horo matene. Prezentiĝis Fajba Volfoviĉ Zaamenhof, loĝanta ĉi tie en Suwałki, tridekjara, en ĉeesto de la atestantoj dudek kvinjara komercisto Lejzer Klinkovŝtejn kaj dudek sepjara bakisto Zelman Ŝarkanski, loĝantaj en Suwałki, kaj prezentis al ni virseksan infanon, naskitan de lia edzino Rajna Percovna havanta dudek ok jarojn ĉi tie en Suwałki je la dudek-sepa tago de januaro en la nuna jaro, je la sepa horo vespere, kiun dum cirkumcido oni nomis Motel, post kio ĉi tiun akton oni legis al la veninto kaj la atestantoj, kiuj deklaris, ke ili ne scias skribi.

Makovski, Oficejo de Civila Stato.

Rimarkindaj estas pluraj aferoj. Unue, la dokumento rekonfirmas³ la naskiĝlokon de Marko, kiu estas la urbo Suwałki troviĝanta tiam en Pola Reĝlando (parto de Ruslanda Imperio), nun en la nord-orienta Pollando. Tio klare malkonfirmas, ke li naskiĝis en Tykocin, kie la familio loĝis post Suwałki kaj antaŭ Bjalistoko. Pri la naskiĝo en Tykocin ĝis nun misinformas tykocinaj retejoj kaj la memortabulo troviĝanta fronte de la tykocina sinagogo, kiun modifi petis ĉi-jare Bjalistoka Esperanto-Societo al la urbestro de Tykocin.

La naskiĝdato estas skribita laŭ la Julia kalendaro, kiu tiam estis oficiala en la tuta Ruslando. La 27a de januaro korespondas al la 8a de februaro laŭ la Gregoria kalendaro.

La nomo de Marko en ĉi tiu dokumento estas Motel, jida varianto de la hebrea nomo Mordeĥaj, uzata ĉefe en interna familia vivo de la judoj. Alia formo de ĝi estas Mordka (Mordĥe).

La oficisto notis, ke la “veninto”, t. e. Fajba Volfoviĉ Zaamenhof kaj la atestantoj estis analfabetaj. En la naskiĝatestilo de Ryfka Zamenhof (naskiĝis la 2an de decembro 1839 Julie, aŭ la 14an de decembro Gregorie), fratino de Marko, oni notas, ke Fajba estis “przekupnik”, kio pollingve signifas etkomerciston, ŝakriston aŭ bazariston.

Ankaŭ la naskiĝatestilojn de la supre menciita Ryfka kaj de Perla (naskiĝis la 30an de julio 1843 Julie, aŭ la 11an de aŭgusto Gregorie), la dua fratino de Marko, oni povas legi en la arkivo en Suwałki. En ĝi kaj en aliaj arkivoj estas retrovindaj

Przemysław Wierzbowski

Kulturo



La plej rimarkinda kultura evento en Esperantujo komence de la 2017a jaro estis la lanĉo de la albumo “Kreaktiva” de la regea kantisto-muzikisto Jonny M. Li mem prezentis sian novan verkon en la novjarfestaj esperantistaj renkontiĝoj en Germanio.

(Foto: Ivo Miesen en JES)

Dancanta kun ŝarkoj

Rakonto de Julian Modest



Ĉio komenciĝis en iu aŭtuna tago. La ĉielo super Romo estis senfine profunda kaj kristale blua. Neniam antaŭe mi vidis tian profundan kaj bluan ĉielon. Mi estis sur placo “Hispanio”, rigardis la ĉielon kaj ŝajne mi profundigis en ĝi. Pli ĝuste mi malrapide flugis al la ĉielo. Ĉiam mi opiniis, ke tiel la animo flugas al la ĉielo, kiam post la morto forlasas la homan korpon.

Verŝajne mi restus longe sur la placo “Hispanio”, rigardante la ĉielon, sed finfine mi devis komenci ian laboron. Mi venis en Italion por labori. Dum kelkaj tagoj mi vagis sur la stratoj, gapis la homojn kaj mi jam komencis enui, ĉar mi ne kutimis esti sen laboro.

Mi ekstaris kaj ekiris. Nesenteblo mi trovis min en parko, en kiu kviete promenadis viroj, virinoj, infanoj. Ili babilis, ridis. La italoj estas gajaj homoj kaj tio plaĉis al mi. Proksime al la parko mi rimarkis grandan cirkon. Antaŭ ĝi estis multaj homoj, kiuj verŝajne aĉetis biletojn por la spektaklo. Jen, kie mi trovas laboron, diris mi al mi mem. Mi eniris la cirkon tra la malantaŭa enirejo kaj alparolis junulon, kiun mi vidis antaŭ mi. Evidentiĝis, ke li estas serbo. Mi diris al li, ke mi serĉas laboron.

– Ho, ĉi tie estas laboro, – respondis la junulo.

La cirko estis serba kaj nun gastis en Italio. La junulo prezentis min al korpulenta liphara viro kaj diris al li, ke mi deziras labori. La viro tuj respondis, ke estas laboro.

– Kion mi faros? – demandis mi.

– Vi dancos kun ŝarkoj.

– Kion? – ne kredis mi al miaj oreloj.

Ĝi estas demonstra versio de la 67-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



Spritaj splitoj kaj preskeraroj de István Ertl probable estas la plej legata rubriko de La Ondo. Oni flustras, ke iu redaktoro eĉ speciale inventas komikajn mistajpojn por esti rimarkita de nia reduktoro, kiu tamen ne konsideras ĉi tiujn artefaritajn (sed faritajn nesufiĉe arte) klopodojn trafi en la rubrikon. Kaj nun novaĵo: István planas libroforme eldoni la kremon de sia kolekto.

Pri kio ridis Zamenhof

Redaktante la unuan Esperantan gazeton *La Esperantisto*, Zamenhof prizorgis ankaŭ la humuran rubrikon *Bagateloj*. Evidente li aperigis tiujn ŝercojn kaj anekdotojn, kiuj li ŝatis. Do, ni vidu, pri kio ridis la 32-jara Ludoviko en la fora jaro 1892a.

Principo. Luigantino de ĉambro: Antaŭ ol Vi enloĝiĝas en mia ĉambro, mi devas al Vi rimarki, ke mi amas, ke oni akurate pagu la luan pagon. – Studento: Tio ĉi estas ankaŭ mia principo; aŭ akurate aŭ tute ne!

Tro granda postulo. – For! Al sanaj kaj fortaj mi almozon ne donas. – Kiel Vi volas; pro Viaj kelkaj centimoj mi al mi piedon de rompos.

Teruraj infanoj. Onklino parolas kun malgranda nevo, kiu ĵus venis el la lernejo: – Nu, ĉu vi lernis aritmetikon? – Certe! – Kion do vi lernis? – Deprenadon. – Aha! Sekve se mi diros al vi, en kiu jaro mi naskiĝis, ĉu vi povos diri, kian aĝon mi havas? – Oho! Tiujn grandajn nombrojn ni en la lernejo ankoraŭ ne lernis!

Memfarita homo. “Jes miaj sinjoroj”, predikas sinjoro A., trinkante sian glason en gaja kolegaro, “mia devizo ĉiam estis: “La homo mem devas ĉion al si ellabori”. Kiu meme al si helpas, al tiu ankaŭ Dio helpas! La 50 000 frankojn, kiujn mi posedas, neniŭ al mi donacis kaj ankaŭ de neniŭ mi ilin heredis, – ne, mi mem ilin gajnis en la loterio!”

Bonigo. Fianĉino: Diru, ĉu estas vera tio, kion mia patrino al mi diris? – Fianĉo: Kion do? – Fianĉino: Ke vi edziĝas je mi, ĉar mi poste havos grandan sumon da mono. – Fianĉo: Sed, mia infano, kontraŭe! Estus al mi eĉ pli agrable, se vi ĝin havus jam nun.

Kiu scias? – Kian doton do havas Via juna edzino? – Mi ne scias; kiam mi antaŭ la edziĝo demandis pri tio ĉi mian bopatron, li fariĝis malĝentila. – Kaj post la edziĝo? – Hm, tiam li fariĝis ankoraŭ pli malĝentila.

Kuraĝulo. “Sinjoro!”, krias unu maljuna fraŭlino el la vagono al unu sinjoro, kiu volas tien eniri: “ĉi ĉi estas la vagono por sinjorinoj!”. – “Ho!” respondas la sinjoro, enirante kaj dismetante siajn pakaĵojn, “mi ne estas timemulo!”

Apetito. Kial vi petas almozojn? – Ĉar mi volas manĝi, mia bona sinjoro. – Kial do vi ne laboras? – Ha, kiam mi laboras, mi ankoraŭ pli volas manĝi.

Niatempa amo. Mi Vin amas... – Sed mi estas malriĉa. – Pardonu, Vi ne lasis min elparoli ĝis la fino... mi amas Vin ne tiel, por edziĝi je Vi... – Ha, ha, ha! Mi volis nur elprovi Vin, mi havas grandegan kapitalon! – Pardonu, Vi tamen ne lasis min fini; mi amas Vin ne tiel, por edziĝi je Vi pro Via mono.

Plukis **Halina Gorecka**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Komitata komunio

Disendo al la komitato (mesaĝo de Renato Corsetti, <https://beta.groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/topics/9813>, 1 jan 2017; rimarkis Rob Moerbeek)

Ĝis 1996 regis malico

Kultura Centro Esperantista en Ĉaŭdefono jam de ... dudek jaroj funkcias danke al la deĵorado de bonvolaj stabanoj de LF-koop... (Kreskanta helpantaro por KCE, HeKo 622 4-B, 14 nov 16, <http://esperantio.net/index.php?id=2999>)

Anemia rento

La rento estas fiksita je 0,80 % kaj restas sen sango gis aperas publika avizo... (*La jaro* 2017, dua kajero, p. 32; rimarkis Ionel Oneț)

Formuela formularo

... la 15an de januaro venas limdato por kandidatiĝi por IJK 2018. Se via landa sekcio interesiĝas, ankoraŭ estas tempo por penigi la formularon! (Arina Osipova, diskutlisto tejo-komitato, 14 jan 2017, legis Paweł Fischer-Kotowski)

Knedliko el Prago

... ekde 1996 aperas kiel doktrino de UEA Manifesto de Prago, kiu komenciĝas per la pompa prembulo. (Walter Ŝelazny. *Ludoviko Lazaro Zamenhof*. Zwierzyniec: Obywatelskie Stowarzyszenie «Ostoja», 2014, p. 134, rimarkis Ionel Oneț)

Sensekrete pri l'futuro, aŭ: Heroldo plu kun enhavo

... mi havas tre bonan rilaton kun la Legio de Bona Volo... kies korespondanto mi estas por «Heroldo de Esperanto»: ankaŭ en la estonteco aperos artikoloj en la gazeto. (Kandidatoj 2016 al la Senato: Anna Bartek (Blanka Listo), HeKo 619 9-C, 22 okt 2016, <http://esperantio.net/index.php?id=2977>)

Saĝa sindeteno, aŭ: Kio se li venintus?

Mi ne venis al Esperanto por antaŭenigi Esperanton. ("Sebastiano", <http://www.liberafolio.org/2016/12/15/uea-denove-sercas-novan-redaktoron/#comment-102>)

Privat ne trudiĝas koston Esperanton

Edmond Privat ne proponis nian lingvon al Ligo de Nacioj por ŝpari la koston de interpretistoj kaj tradukistoj... (Debato en Milano pri EU post la brita secesio, HeKo 622 3-E, 12 nov 2016, <http://esperantio.net/index.php?id=2998>)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paivi.saarinen@iki.fi.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: schwanzer@esperanto-buchversand.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japania Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarett 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!

PRINTEMPOS

de la 14-a ĝis la 22-a de Aprilo 2017
en la kastelo Grésillon (Francio)

* *Esperanto-kursoj por ĉiuj niveloj*

* *Aktivadoj kaj ekskursoj*

* *Seminario AMO (16-20 de Aprilo)*

* *Prelegoj kaj atelieroj*

* *Trapasu esperanto-ekzamenojn (ILEI)*

instruos, gvidos kaj prelegos :



Zsófia
KORODY



Christophe
CHAZAREIN



Marion
QUENUT



Mireille
GROSJEAN



Sara
SPANÓ



Stefan
MacGILL

*Alflugu de
Londono
por malpli ol
50€*



Moskva Esperanta Asocio MASI

Antaŭprintempa Esperanto-Renkontiĝo

APERŬ - 11

METAMORFOZOJ



23-26.02.2017

Jerŝovo Rusio